liaj paroloj oni sentis bedaŭron sinceran, ke liaj malfeliĉoj kondukis lin ĝis tie. Sed, se mi ne volas senkulpigi kion li kondamnis mem tiel laŭte, tamen, por neniam pri tio paroli, mi diru ke, kiel en la eterna gloro la kulpoj de l' sanktaj pentintoj, kovritaj per iliaj kompensaj bonagoj kaj per senmezura brilego de la dia mizerikordo, ne aperas plu; same, en kulpoj tiel sincere konfesitaj kaj poste tiel glore kompensitaj per fidela servado, oni devas rigardi nur al la humila konfeso de l' princo, kiu pentis, kaj al la pardonemo de l' granda reĝo, kiu forgesis.

Kaj se do fine li estas fortrenita al tiuj mizerplenaj militoj, tie li havos almenaŭ la gloron, ke li ne lasis malnobligi sian altrangecon ĉe fremduloj. Malgraŭ la majesteco de l' Imperio, malgraŭ la fiereco de Aŭstrujo, kaj la kronoj heredaj en tiu monarĥa familio, eĉ en la parto kiu ĉefas en Germanujo; rifuĝinta en Namur, forta nur per sia granda koro kaj glora famo, li levis tiel alten la honorrajtojn de princo de Francujo kaj de la unua Sango en universo, ke li ellasis neniun alian cedon, ol samrange rilati kun la ĉefduko, kvankam frato de l' imperiestro kaj ido de tiom da imperiestroj, kondiĉe ke en neŭtrala loko tiu princo subrilatos al li en nomo de Nederlando. Saman honoron oni garantiis al duko de En-

ghien ([24]), kaj la Sango de Francujo konservis sian antaŭrajton super la Aŭstra familio, eĉ en Bruselo. Sed vidu al kio instigas vera kornobleco. Dum la princo staris tiel fiere antaŭ potencanta ĉefduko, li donis al reĝo de Anglujo([25]) kaj al duko de York ([25]), tiel fama reĝo nun, malfeliĉa tiam, ĉiujn honorojn al ili ŝuldatajn; kaj fine li montris al la tro malŝatema Hispanujo, kia estas tiu majesto, kiun malbona sorto ne povas rabi de princoj tiel grandaj. Lia cetera konduto ne estis malpli alta. Meze de la malfacilaĵoj, kiujn liaj interesoj kaŭzis en la traktato de l' Pireneoj, aŭskultu, kiaj estis liaj ordonoj, kaj vidu ĉu iam privatulo traktis tiel noble pri siaj interesoj. Li skribordonas al siaj agentoj en la konferenco, ke ne estas juste, ke kaŭze de li mem la paco de l' kristanaro plue prokrastiĝas: ke por liaj amikoj oni klopodu; kaj lin oni lasu sekvi sian sorton. Ha! kia granda viktimo sin oferas al komuna utilo! Sed kiam la okazoj aliiĝis, kiam Hispanujo volis al li doni aŭ Cambrai kun ĝia ĉirkaŭaĵo, aŭ la Luksemburgon tutsuverene,

---

([24]) La granda Condé estis forlasinta tiun titolon post la morto de sia patro en 1646, kaj lia plej maljuna filo estis ricevinta ĝin.

([25]) La filoj de la mortigita Charles I-a, nome la estonta reĝo Charles II-a (1660-1685) kaj lia frato, duko de York, estonta reĝo James II-a (1685-1688).

li deklaris, ke pli ol tiujn profitojn, pli ol ĉian ajn plej grandan donaĵon li preferas kion? sian devon kaj plaĉi al la reĝo. Tion li ĉiam havis en la koro; tion li senĉese ripetis al duko de Enghien. Nun li sekvis sian naturan emon; post tiuj lastaj trajtoj nenio plu mankis al li, kaj Francujo vidis en li tiun neprecizeblan perfektecon, kiun aldonas malfeliĉoj al la grandaj virtoj: ĝi revidis lin doni sin pli ol iam ajn al la Ŝtato kaj al sia reĝo. Sed en siaj unuaj militoj nur unu vivon li povis foroferi: nun li havas alian pli karan al li ol lia mem. Plenuminte glore, laŭ lia ekzemplo, la tempon de sia studado, duko de Enghien estas preta por sekvi lin en bataloj. La princo ne nur instruas lin pri la milito kaj daŭrigos ĝis la fino per siaj paroloj, sed plie kondukas lin al vivantaj lecionoj kaj al praktiko. Mi flanklasu la pason trans Rejnon, la mirindaĵon de nia epoko kaj de l'vivo de Louis la Granda. En la batalo apud Senef, la juna duko, kvankam li komandas, kiel jam antaŭe en aliaj militiroj, venas en plej krutaj kontraŭaĵoj lerni la batalarton ĉe flanko de sia patro princo. Meze de tiomaj danĝeroj, li vidas tiun grandan princon renversitan en fosaĵo sub sangokovrita ĉevalo. Dum li proponas la sian kaj zorgas por relevi la faligitan princon, li estas vundata inter la brakoj de patro tiel amema, kaj

ne ĉesas flegi, ravata ke li povas pagi samtempe al pieco kaj al gloro. Kion povis pensi la princo, se ne ke, por plenumi plej grandajn agojn, nenio mankos al tiu inda filo, krom la okazoj? Kaj same kiel lia estimo, lia amemo plifortiĝadis.

Ne nur por filo aŭ por sia familio li sentis tiel ame. Mi vidis lin, kaj ne juĝu trograndiga mian parolon, mi vidis lin profunde kortuŝitan pro amikoj en danĝero; mi vidis lin senafekte simplan speguli sur sia vizaĝo la rakonton de iliaj malfeliĉoj, partopreni kun ili en plej malgravaj aferoj kiel en plej gravaj; en interpacigoj, kvietigi spiritojn acidoplenajn kun pacienco kaj mildeco tute ne espereblaj de tiel viveca naturo, nek de tia altrangeco. For, for la herooj sen humaneco! Ili ja povos trudi respektojn kaj perforti admiron, kiel ĉiu eksterordinaraĵo, sed la korojn ili ne algajnos. Kiam Dio formis la koron kaj la intimon de l' homo, tien li metis antaŭ ĉio la bonecon kiel la propran karakteron de l' dia naturo, kaj por esti kvazaŭmarko de tiu bonfara mano, el kiu ni elvenas. En boneco devus do konsisti la fundo de nia koro, en ĝi devus esti samtempe la unua allogo, kiun ni havus en ni mem por gajni la aliajn homojn. La grandeco, kiu alvenas super ĝin, anstataŭ malfortigi la bonecon, havas nuran celon helpi al ĝia pli-

disvastiĝo, kiel publika fontano, kiun oni altigas por ĝin plidisverŝi. Tiom kostas la koroj; kaj la granduloj, al kiuj fremda estas la boneco, juste punataj pro sia aroganta nesentemo, restos por ĉiam senigitaj je la plej granda bono de l' homa vivo, nome la dolĉaĵoj de socieco. Neniam homo pli ĝuis ilin, ol la princo, pri kiu ni parolas; neniam homo malpli timis, ke senaroganteco ofendos respekton. Ĉu tiu estas la sama, kiu perfortis urbojn kaj gajnis batalojn? Kio? Li ŝajnas forgesinta tiun altan rangon, pri kies defendo li sin montris tiel zorga! Rekonu la heroon, kiu, ĉiam egala al si mem, nek plialtiĝante por ŝajni granda, nek malleviĝante por esti afabla kaj servema, nature rilatas al ĉiuj plej ĝuste kaj konvene: simile al riverego majesta kaj bonfara, kiu kviete alportas en urbojn la saman sufiĉegon, kiun ĝi disverŝis en kampojn per siaj akvoj; kiu sin donas al ĉiuj, kaj nek sin levas nek sin ŝvelas, se oni ne kontraŭbaras perforte la malkrutan deklivon, kiu instigas ĝin pluenpuŝi sian fluon sentumultan. Tia estis la mildeco, kaj tia estis la forteco de princo de Condé. Vi havas sekreton gravan? Verŝu ĝin sentime en tiun noblan koron: via afero fariĝas lia per la konfido. Al tiu princo nenio ŝajnas pli respekteginda, ol la sanktaj rajtoj de l' amikeco. Se oni petas favoron de li,

estas li, kiu ŝajnas la dankanto ; kaj neniam oni vidis pli varman kaj naturan ĝojon, ol tiun, kiun li eksentis donante plezuron. La unuan monon ricevitan el Hispanujo kun permeso de l' reĝo, malgraŭ siaj mastrumaj bezonoj urĝegaj, li donis al siaj amikoj, kvankam post la paco li povis nenion esperi de ilia helpo ; kaj kvar cent mil skutoj ([26]) disdonitaj laŭ liaj ordonoj elmontris, maloftaĵo en homa vivo, la dankemon tiel varman en princo de Condé, kiel oni vidas en aliaj la esperon alligi al si la homojn. Por li la virto ĉiam estis plenvalora. Ĝin li laŭdis eĉ en siaj malamikoj. Ĉiufoje, kiam li devis paroli pri siaj agoj, kaj eĉ en la raportoj senditaj de li al la kortego, li gloris la decidiĝojn de l' unu, la maltimon de l' alia ; ĉiu havis konvenan lokon en liaj rakontoj ; kaj inter la indoj, kiujn li disdonis ĉiuflanken, oni ne sciis kien meti la faritaĵojn de li mem. Senenvie, sincere kaj senafekte, ĉiam granda en agemo kaj en ripozo, li montris sin tia en Chantilly ([27]), kia en komando de l' armeoj. Se li pliornamis tiun luksoriĉan kaj ĉarmo-

---

([26]) Skuto (france : écu) estis monero valoranta plimalpli 5 frankojn.

([27]) En 1675 Condé detiris sin de la publika vivo kaj pasigis siajn lastajn vivjarojn en sia kastelo Chantilly, je 40 kilometroj norde de Parizo.

plenan loĝejon, aŭ provizis tendaron meze de malamika lando kaj fortikigis urbon; se li marŝis kun armeo inter danĝeroj, aŭ kondukis siajn amikojn en tiuj belegaj aleoj ĉe bruo de tiom da ŝprucofontanoj nek en tago nek en nokto silentiĝantaj, li ĉiam estis la sama homo, kaj lia gloro sekvis lin ĉie. Kiel bele estas post bataloj kaj tumulto de l' armiloj, se oni scias ankoraŭ ĝui tiujn kvietajn virtojn kaj trankvilan gloron, en kiuj nek la soldato nek la sorto prenas ian parton; en kiuj ĉio logas sen blindiga brilo; al kiuj oni rigardas ne surdigate aŭ per sonado de trompetoj, aŭ per bruado de kanonoj, aŭ per kriado de vunditoj; en kiuj la homo aperas tute sola tiel granda, tiel respektata, kiel se li komandas kaj se ĉio marŝas laŭ lia ordono.

Nun mi venu al la kvalitoj de l' spirito; kaj, ĉar bedaŭreginde tio, kio estas plej pereiga al la homa vivo, nome la militarto, estas samtempe ĝia plej sagaca kaj lerta produkto, mi komencu esplorante tiuflanke la grandan genion de nia princo. Kaj, unue, kiu generalo iam ajn puŝis pli detalen sian antaŭzorgon? Estis unu el liaj reguloj, ke malamikojn oni devas timi malproksimajn, por ne plu timi apudajn, kaj ĝoji se ili alvenas. Lin ĉu vi vidas, kiel zorge li taksas ĉiun superecon, kiun li povas aŭ liveri aŭ preni? Kiel rapide lia sagaceco

ekkaptas en unu momento tempojn, lokojn, personojn, kaj ne nur iliajn interesojn kaj talentojn, sed ankaŭ iliajn spiritinklinojn kaj kapricojn? Lin ĉu vi vidas, kiel li kalkulas kavalerion kaj infanterion malamikajn, per la karaktero de la landoj aŭ de l' princoj federitaj? Nenion preterlasas lia antaŭzorgo. Dank' al tiu mireginda ĉiovideco super la tuto de l' detaloj kaj la universala plano de l' milito, lin oni vidas ĉiam atentan al la okazaĵoj; li tiras el dizertinto, el transveninto, el kaptito, el pasanto, kion li volas diri, kion silenti, kion li scias, kaj kvazaŭe kion li ne scias, tiel firme li konsekvencigas. Liaj esploristoj raportas al li ĉion eĉ plej malgravan; oni vekas lin ĉiumomente; ĉar ankaŭ tiun ĉi regulon li havis, ke lerta armeestro povas ja esti venkita, sed ne havas permeson esti surprizita. Ke li do neniam estis, tiun laŭdon ni ŝuldas al li. Je kioma ajn horo kaj el kia ajn flanko venas la malamikoj, ili trovas lin ĉiam prizorgintan, ĉiam pretan torenti sur ilin kaj gajni superecojn: kvazaŭ aglo, kiun oni ĉiam vidas, ĉu ĝi flugas meze de l' aeroj, ĉu ĝi sidiĝas supren de iu roko, direkti ĉiuflanken rigardojn akrajn, kaj fali sur sian rabaĵon tiel nepre, ke ĝian ungegojn oni ne povas eviti pli ol ĝiajn okulojn. Tiel viglaj estis la rigardoj, tiel rapidega kaj uragana estis la atako, tiel fortaj kaj neevit-

eblaj estis la manoj de princo de Condé. En lia tendaro oni ne konas la vanajn terurojn, kiuj lacigas kaj tedas pli ol la realaj. Ĉiuj fortoj konservas sin tutaj por veraj danĝeroj ; ĉio staras preta ĉe l' unua signalo ; kaj, kiel diras la Profeto, « ĉiuj sagoj estas akrigitaj, « kaj ĉiuj arkoj streĉitaj [28] ». Atendante oni ripozas en trankvila dormo, kvazaŭ sub sia tegmento meze de siaj muroj. Ripozas ? kia vorto ! En Pieton [29], apud tiu korpuso timinda, kiun kunigis koalicio triregna, ĉe niaj soldatoj estis amuziĝoj senĉesaj : la tuta armeo ĝojadis, kaj ĝi neniam eksentis, ke ĝi estas pli malforta, ol la malamika. La princo, enpostenigante tie, estis firmiginta ne nur nian tutan landlimon kaj nian tutan fortikaĵaron, sed ankaŭ nian tutan soldataron ; li gardas, tio sufiĉas. Fine la malamiko ekforlokiĝas ; tion atendis la princo. Ĉe tiu unua moviĝo li marŝas; jam la nederlandan armeon kun ĝiaj belegaj standardoj li ne preterlasos : ĉio naĝas en sango, ĉio fariĝas rabaĵo ; sed Dio scias starigi limojn ĉirkaŭ plej belaj projektoj. Dume la

---

[28] « Sagittæ ejus acutæ, et omnes arcus ejus extenti. » (Jesaja, V, 28).

[29] Condé estis lokinta sin tre fortike apud la rivero Sambre. Apud Senef okazis la plej mortiga batalo de la tuta milito (Louis XIV-a kontraŭ koalicio de Germanujo, Hispanujo, Nederlando).

malamikoj estas ĉie dispelataj, Oudenarde iĝas libera el iliaj manoj; el tiuj de l' princo por ilin mem tiri, la ĉielo kovras ilin per densa nebulo; timego kaj dizertado disvastiĝas ĉe iliaj soldatoj; oni jam ne scias, kio fariĝis el tiu timeginda armeo. Tiam ja Louis, kiu, fininte la krutan sieĝon de Besançon kaj ankoraŭ unu fojon submetinte la Franche-Comté [30] en senekzempla rapideco, estis reveninta tute glorbrila por profiti la agadon de siaj armeoj de Flandro kaj de Germanujo, komandis tiun taĉmenton, kiu faris en Alsaco la mirindaĵojn de vi konatajn, kaj aperis la plej granda el ĉiuj viroj tiom pro la nekredeblaĵoj faritaj de li persone, kiom pro tiuj faritaj de li per liaj generaloj.

Kvankam tiel grandajn donojn alportis al nia princo lia kvalitoplena naturo, li ĝin pliriĉigis senĉese per siaj meditoj. La armeordigojn de Cezaro li pristudadis. Mi memoras, ke li ravis nin, rakontante kiel en Katalunujo, en la lokoj kie tiu fama komandisto pro pli favora enpostenigo devigis kvin legiojn romanajn kaj du spertajn generalojn demeti la armilojn sen batalo, li mem iris por esplori la riverojn kaj montojn, kiuj helpis al tiu granda faro; kaj neniam tiel inda majstro

---

[30] Provinco oriente de Burgundujo.

estis klariginta en tiel kleraj instruoj la komentariojn de Cezaro. La komandistoj en l' estontaj jarcentoj faros similan honoron al li. Oni venos por studi sur la lokoj kion rakontos la historio pri l'enposteniĝo apud Pieton, kaj pri la mirindaĵoj postokazintaj. Oni rimarkos en tiu apud Chatenoy la altaĵon okupitan de tiu granda estro kaj la rivereton, per kiu li sin ŝirmis, kanonpafate el la fortikaĵo de Schelestad (31). Tie oni vidos lin neniomtaksi Germanujon interligitan, sekvi siavice la malamikojn kvankam pli fortajn, igi senutilaj iliajn projektojn, kaj devigi ilin malsieĝi Saverne (32), kiel li estis farinta antaŭnelonge pri Haguenau. Per tiaj frapoj, plenmultaj en lia vivo, li portis tiel alten sian reputacion, ke en nia epoko estos fama inter la homoj kaj merita inter la soldatoj kiu ajn militis sub princo de Condé, kaj kvazaŭe rajtos komandi kiu ajn vidis lin agi.

Sed se iam li sin montris eksterordinara homo, se li sin montris lumspirita kaj vidanta trankvile ĉiujn aferojn, ĝi estis en tiuj rapidaj momentoj, de kiuj dependas la venkoj, kaj en la flameco de l' batalo. En ĉiu alia tempo li interdiskutas ; aŭskultema, li atentas al ĉiuj

---

(31) Germane Schlettstadt.
(32) Germane Zabern.

konsiloj ; nun, ĉio prezentiĝas kune: la multego de l' objektoj ne konfuzas lin ; tuj li decidiĝas ; li ordonas kaj agas samtempe, kaj ĉio progresas samcele kaj firme. Ĉu mi diros ? Sed kial timi, ke la gloron de tiel granda viro povos difekti tiu ĉi konfeso ? Ne plu estas tiuj subitaj ekboloj, kiujn li sciis tiel rapide kaj agrable kompensi, sed kiujn tamen li elmontris iafoje en la ordinaraj okazoj : vi kredus, ke en li estas alia homo, al kiu lia granda animo forlasas pli malgravajn farojn, je ĝia zorgo ne indajn. Ĉe l' interpafado, ĉe l' interatako, ĉe l' interskuo subite aperas ia neesprimebla io tiel neta, tiel modera, tiel viva, tiel flama, tiel milda, tiel agrabla al la siaj, tiel fiera kaj tiel minaca al la malamikoj, ke oni ne scias el kie povas veni al li tiu miksaĵo de kvalitoj tiel kontraŭaj. En tiu terura tago kiam, ĉe pordegoj de l' urbo kaj sub vido de liaj samregnanoj [33], ŝajnis ke la ĉielo volas decidi pri la destino de tiu princo ; kiam estis kontraŭ li, kun la floro el la soldatoj, generalo tiel insista ; kiam li vidis sin pli ol iam ajn sub-

---

[33] La batalo antaŭ Parizo, ĉe la pordego Saint-Antoine (2-a de julio 1652), en kiu Condé, generalo de la Frondo, estis premata inter Parizo malantaŭe kaj la reĝa armeo sub Turenne antaŭe. — (Vidu la antaŭparolon).

metata al la kapricoj de l'sorto; dum el ĉiu flanko venis atakoj, la apud li batalintoj diris ofte al ni ke, se oni havus ian gravaĵon traktotan kun tiu princo, oni povus elekti tiajn momentojn, kiam ĉio flamis ĉirkaŭ li, tiel alten atingis lia spirito nun, tiel lumigata kvazaŭ de supre vidiĝis lia animo en tiuj teruraj okazoj: simile al tiuj altaj montoj, kies pinto super nuboj kaj ventegoj aperas serena ĉar altega, kaj perdas neniun radion de la lumo ĉirkaŭa. Tiel, en la ebenaĵoj apud Lens, nomo agrabla al Francujo, la Ĉefduko ([34]), malgraŭ siaj intencoj tirite el neperfortebla posteno per logo de sukceso trompanta, dank' al subita ekmovo de l'princo, kiu kontraŭstarigas freŝajn soldatojn anstataŭ lacaj, estas devigata forrapidi. Pereas liaj maljunaj soldatoj; lia kanonaro, al kiu li tutfidis, estas en niaj manoj; kaj Beck, kiu esperigis lin pri venko certa, kaptita kaj vundita en la batalo, venas mortante doni malĝojigan ateston al sia venkanto per sia malespero. Ĉu necesas helpi aŭ perforti urbon? la princo scios profiti ĉian okazon. Ekzemple, apenaŭ informite dank' al hazardo pri grava sieĝo, li trakuras, tro rapide ([35]), grandan landon tutan; kaj ĉe l'unua

---

([34]) Ĉefduko Leopold, frato de l'Imperiestro.

([35]) « Tro rapide », kredeble ĉar tiam li batalis kontraŭ Francujo.

vido li ektrovas pasejon certan por helpi, tra la lokoj, kiujn vigla malamiko ne ankoraŭ povis sufiĉe gardi. Ĉu li sieĝas iun fortikurbon? li eltrovas ĉiutage novajn rimedojn por plifruigi ties akiron. Oni kredas, ke li riskas la soldatojn ; li domaĝas ilin, mallongigante la tempon de l' danĝeroj per la viveco de l' atakoj. Sub tiom da frapoj mirigaj, la plej kuraĝaj fortikaĵestroj ne plenumas la promesojn faritajn al siaj generaloj: Dunkerque estas kaptita post dektri tagoj meze de l' aŭtunaj pluvoj ; kaj ĝiaj barkoj, tiel timitaj de niaj interliganoj, aperas subite en la tuta oceano kun niaj standardoj.

Sed kion saĝa generalo devas plej bone koni, ĝi estas liaj soldatoj kaj estroj. Ĉar de tio ĉi venas la akordo perfekta pro kiu la armeoj agas kvazaŭ unu korpo, aŭ, por paroli kun la Skribo, « kvazaŭ unu viro » : *Egressus est Israel tanquam vir unus* (36). Kial, kvazaŭ unu viro? Ĉar sub unu sama estro, kiu konas soldatojn kaj estrojn kiel siajn brakojn kaj manojn, ĉio estas same viveca kaj modera. Tio ja liveras la venkon ; kaj mi aŭdis el nia granda princo, ke ĉe la batalo apud Nordlingen certigis lin pri la sukceso tio ĉi, ke li konis S-ron de Turenne, kies plejsperta lerteco

(36) I Samuel, XI, 7.

bezonis neniun ordonon por fari ĉion necesan. Tiu ĉi proklamis siavice, ke li agas sen ia timeto, ĉar li konas la princon kaj liajn ordonojn ĉiam fidindajn. Tiele ili reciproke donis al si trankvilecon, kiu turnis ĉiun el ili tutan al lia agokampo : tiele finiĝis sukcese la plej pridisputita el ĉiuj bataloj, kiuj ĝis nun okazis.

Tio ĉi estis en nia epoko granda spektaklo, vidi en sama tempo kaj en samaj militiroj tiujn ambaŭ virojn, kiujn la voĉo komuna de tuta Eŭropo egaligis al la plej grandaj komandistoj de l' estinta jarcentaro ; jen estroj de korpusoj malkunaj ; jen unuigitaj ankoraŭ pli per samceleco de samaj pensoj ol per la ordonoj, kiujn la subulo ricevis de l' alia ; jen kontraŭaj fronto ĉe fronto, kaj pliakrigantaj unu ĉe la alia agemon kaj prizorgemon ; kvazaŭ Dio, kies saĝo ofte, laŭ la Skribo, ĝuas en l' universo [37], volus al ni elmontri ilin en ĉiuj formoj, kaj kune elmontri ĉion, kion li povas fari el la homoj. Kiom da enposteniĝoj, da belaj marŝoj, da maltimaĵoj, da prizorgoj, da danĝeroj, da helprimedoj ! Ĉu iam oni vidis en du viroj la samajn ecojn, kun karakteroj tiel malsimilaj, por ne diri tiel kontraŭaj ? Unu ŝajnas agi el pripensoj profundaj, kaj la alia el subitaj lumiĝoj : tiu

---

[37] Proverbia, VIII, 30.

ĉi sekve pli viveca, sed neniom trofruigema en sia fajro; tiu pli flegmaspekta, sed neniam malrapidema, pli sentima en faro ol en parolo, firma kaj decidema interne, eĉ se li ŝajnis embarasata ekstere. Unu, tuj kiam li aperis en la armeoj, vekas altan ideon pri sia valoro, kaj esperigas ion eksterordinaran, sed tamen progresas paŝo post paŝo, kaj kvazaŭ pograde atingas la mirindaĵojn, en kiuj finiĝis lia vivo; la alia, diinspirate, tuj ĉe l' unua batalo samviciĝas kiel la majstroj plej spertoplenaj. Unu per vivecaj kaj senĉesaj penoj alkaptas la admiron de l' tuto da homoj, kaj silentigas la envion; la alia dekomence lumradias tiel brilege, ke ĝi ne maltimis ataki lin. Unu, fine, per la profundeco de sia genio kaj la nekredeblaj helprimedoj de sia kuraĝo sin levas super plej grandajn danĝerojn, kaj scias eĉ profiti ĉiujn mankojn de l' sorto; la alia, kaj per la supereco de tiel nobela deveno, kaj per tiuj grandaj pensoj el la ĉielo sendataj, kaj per ia instinkto admirinda, kies sekreton la homoj ne konas, ŝajnas naskita por altreni la sorton al siaj celoj kaj perforti la fatalon. Kaj, por ke oni ĉiam vidu en tiuj ambaŭ viroj grandajn karakterojn, sed malsimilajn, unu, forrabita per subita frapo, mortas por sia lando kvazaŭ Judas Machabæus; la armeo ploras super li kvazaŭ super sia patro; kaj la kortego kaj la

tuta popolo ĝemas; lia pieco estas laŭdata kiel lia kuraĝo, kaj lian memoron ne velkigas la tempo: la alia, levita per la armiloj ĝis la plej supra gloro kvazaŭ David, mortas kiel li en sia lito proklamante la laŭdojn de Dio kaj instruante sian familion, kaj lasas ĉiujn korojn plenaj tiel de l' brilo de lia vivo kiel de l' mildeco de lia morto. Kia spektaklo estas vidi kaj observi tiujn ambaŭ virojn, el kiuj ĉiu montris, kiun grandan estimon meritis la alia. Tion vidis nia epoko; kaj tion ĉi ankoraŭ pli grandan, ĝi vidis reĝon, kiu uzis tiujn ambaŭ grandajn estrojn, kaj profitis la helpon de l' ĉielo; kaj, perdinte ambaŭ pro morto de l' unu kaj malsano de l' alia, elpensis pli grandajn planojn, elfaris pli grandajn agojn, sin levis super sin mem, plenumis pli ol esperis la siaj, pli ol atendis la universo: tiel alta estas lia kuraĝo, tiel ampleksa lia spirito, kaj lia destino tiel glora.

Jen, Sinjoroj, la spektakloj kiujn Dio donas al la universo; kaj la viroj, kiujn li sendas en ĝin, kiam en ĝi li volas ke glorbrilu, foje en unu nacio, foje en alia, laŭ liaj eternaj decidoj, lia povo aŭ lia saĝeco; ĉu efektive liaj proprajoj diaj aperas pli bone en la ĉieloj, kiujn li formis per siaj fingroj, ol en tiuj nekomunaj talentoj, kiujn li disdonas laŭ sia plaĉo al la viroj eksterordinaraj? Kiu astro

en la firmamento pli bele lumas, ol lumis princo de Condé en Eŭropo? Brilon ne nur la milito al li donis; lia granda genio ampleksis ĉion, antikvon kiel modernon, historion, filozofion, teologion plej altegan, kaj artojn kaj kune sciencojn. Estis nenia ajn libro, kiun li ne legis; estis nenia ajn homo eminenta aŭ en ia spekulativo, aŭ en ia praktiko, kun kiu li ne interparolis: ĉiuj foriradis de li pli lumplenaj, kaj plirektigadis siajn pensojn, aŭ sekve de liaj penetremaj demandoj aŭ de liaj saĝaj pririmarkoj. Tial lia konversacio estis ĉarmo, ĉar li sciis kun ĉiu laŭ liaj talentoj priparoli; kaj ne nur kun militistoj iliajn entreprenojn, kun korteganoj iliajn interesojn, kun politikuloj iliajn traktadojn; sed ankaŭ kun vojaĝistoj sciamaj kion ili ekkonis aŭ en naturo, aŭ en ŝtatregado aŭ en komerco; kun metiisto liajn elpensojn; kaj fine kun scienculoj ĉiaspecaj kion ili trovis plej mirindan. De Dio venas tiuj donacoj: kiu pridubas? Tiuj donacoj estas admirindaj; kiu ne vidas ilin? Sed por konfuzi la homspiriton, kiu fieras pro tiaj donacoj, Dio ne timas komuniki ilin al siaj malamikoj. Sankta Aŭgusteno konsideras inter la idolanoj tiom da saĝuloj, da venkistoj, da grandaj leĝdonintoj, da bonegaj regnanoj, kia Sokrato, kia Mark-Aŭrelo, kia Scipio, kia Cezaro, kia Aleksandro, ĉiuj neallasitaj al la kono

al Dio, kaj detenataj for de lia regno eterna. Ĉu do ne Dio faris ilin? Sed kiu alia povis ilin fari, se ne tiu, kiu ĉion faris en ĉielo kaj en tero? Sed kial li faris ilin? Kaj kiaj estis la celoj apartaj de tiu saĝo profunda, kiu neniam faras ion vane? Aŭskultu la respondon de Sankta Aŭgusteno: « Li faris ilin, diras li, « por ornami la nunan vivon. » *Ut ordinem sæculi præsentis ornaret* (38). Li faris en la grandaj homoj tiujn kvalitojn nekomunajn, same kiel li faris la sunon. Tiun belan astron kiu ne admiras? kiu ne estas ravata de ĝia plenbrilo tagmeza, kaj de ĝia belega ornamaro ĉe leviĝo kaj subiro? Sed ĉar Dio igas ĝin lumi super la bonaj kaj super la malbonaj, ne per tiel bela objekto ni iĝas feliĉaj: Dio faris ĝin por beligi kaj lumigi la mondon, tiun ĉi grandan teatron. Same, kiam li faris en siaj malamikoj tute kiel en siaj servantoj tiujn belajn lumojn de spirito, tiujn radiojn de lia inteligenteco, tiujn figurojn de lia boneco, ne por ilin feliĉigi tiajn riĉaĵojn li donacis; tio estas dekoracio de l' universo, tio estas ornamo de l' nuna vivo. Kaj vidu la malfeliĉan destinon de tiuj homoj, kiujn li elektis ornamo de ilia epoko. Kion ili volis, tiuj superaj, se ne laŭdojn kaj la gloron,

---

(38) Contra Julianum Pelagianum, V. 14.

kiun homoj donas ? Eble, por ilin konfuzi, Dio rifuzos tiun gloron al ilia vana sopiro ? Ne, li pli bone konfuzas ilin donante ĝin, eĉ super ilia atento. Tiu Aleksandro, kiu celis nur brui en la mondo, bruis super sia plej maltima espero. Devige li aperas ankoraŭ en ĉiuj niaj laŭdparoladoj ; kaj ŝajnas ke, per ia fatalo glorplena por tiu venkisto, neniu princo povas ricevi laŭdojn ne partodonante al li. Se ian rekompencon postulis tiuj grandaj faroj de l' Romanoj, Dio sciis trovi unu respondan kune al iliaj meritoj kaj deziroj. Rekompence al tiuj li donas potencon super la mondo, kiel donacon nulprezan. Ho reĝoj, konfuziĝu en via grandeco ; triumfistoj, ne prikantu viajn venkojn. Rekompence al tiuj li donas gloron de l' homoj : rekompenco kiu ne venas ĝis ili, kiu penas por sin ligi, kio ? eble al medaloj, eble al statuoj elterigitaj, restaĵoj de l' jaroj kaj de l' barbaroj ; al ruinoj de iliaj monumentoj kaj faritaĵoj, kiuj penas kontraŭ la tempo ; aŭ pli ĝuste al ideo, al ombro, al tiel nomata ilia nomo. Jen la inda prezo de tiom da laboroj, kaj en superplenumitaj deziroj la pruvmontro de ilia eraro. Venu, satigu vin, grandaj de la tero ; ekkaptu, se vi povas, tiun fantoman gloron, imite de la grandaj viroj, kiujn vi admiras. Dio, kiu en l' inferoj punas ilin malhumilajn, ne enviis al ili, diras sankta

Aŭgusteno, tiun gloron tiom deziratan ; kaj « vantaj ili ricevis rekompencon tiel vantan, « kiel iliaj deziroj. » *Receperunt mercedem suam, vani vanam* (39).

Ne tiel okazos ĉe nia granda princo : la horo de Dio alvenis, horo atendita, horo dezirita, horo de mizerikordo kaj de graco. Kvankam ne avertas iu malsano, kvankam ne urĝas, li plenumas kion li primeditis. Saĝa religiulo, kiun li alvokas speciale, ordigas la aferojn de lia konscienco : li obeas, humila kristano, lian decidon ; kaj neniu dubis iam pri lia vera kredo. De tiam do oni vidis lin ĉiam serioze zorgantan por venki sin mem, por igi vanaj ĉiujn atakojn de liaj netolereblaj doloroj, por el ili fari per sia submetiĝo senĉesan oferon. Dio, kiun li alvokis fide, donis al li emon al lia Skribo, kaj en tiu dia libro la piecon, nutradon fortigan. En liaj decidoj regis pli ol iam ajn la justo ; el ili helpon ricevis vidvino kaj orfo, al ili konfide alproksimiĝis malriĉulo. Serioza same kiel afabla familipatro, ĝuante plaĉon kun siaj infanoj, al ili senĉese li inspiris sentojn de la vera virto ; kaj tiu ĉi juna princo lia nepo sentos por ĉiam, ke kulturis lin manoj tiaj. Lia tuta domanaro profitis lian ekzemplon. Kelkaj el liaj domanoj estis bedaŭrinde

(39) Enarratio in Psalm. CXVIII, Serm. XII.

edukitaj laŭ l' eraro, kiun Francujo toleris tiam ([40]). Kiom da fojoj oni vidis lin timantan pro ilia savo, malĝojan pro malcedo, konsolatan pro konvertiĝo. Kun kia senkompara spiritklareco li montris al tiuj ĉi la antikvecon kaj verecon de la religio katolika ? Ne plu estis tiu flama venkanto, kiu kvazaŭe volis ĉion perforti : estis mildeco, pacienco, karito, kiu celis algajnon de koroj kaj bonfartigon de malsanaj spiritoj. Jen, Sinjoroj, tiuj simplaĵoj, regi sian familion, edifi siajn domanojn, mastri juste kaj mizerikorde, plenumi bonon kiun Dio volas, kaj akcepti malbonojn, kiujn li sendas; jen tiujn komunajn praktikaĵojn de l' vivo kristana laŭdos Jesukristo en la lasta tago antaŭ siaj sanktaj anĝeloj kaj antaŭ sia ĉiela Patro. La historioj nulfalos kun la regnoj, kaj neniu plu parolos pri ĉiuj brilegaj tiuj faroj plenigantaj ilin. Dum li pasigis sian vivon en tiuj zorgoj, kaj levis super siajn plej famajn agojn la gloron de tiel bela kaj pia retiriĝo, la sciigo pri malsano de dukino de Bourbon ([41]) venis en Chantilly, kiel fulmo-

---

([40]) *Tiam*, tio estas antaŭ 1685. Bossuet aludas la protestantismon. Louis XIV-a nuligis en 1685 la edikton de Nantes, kiu estis cedinta kelkajn garantiaĵojn al la protestantoj.

([41]) Dukino de Bourbon, edzino de lia nepo, filino de Louis XIV-a kaj de Sinjorino de Montespan.

bato. Kiun ne trafis la minaco, ke estingiĝos tiu naskiĝanta lumo? Oni ektimis, ke ŝi havos la sorton de fruflorantaĵoj. Kiaj estis la sentoj de princo de Condé, kiam li vidis sin minacata perdi tiun novan ligilon de lia familio kun la reĝa persono? En tiu do okazo estis mortonta la heroo? Tiu ĉi, kiun ne povis forkapti tiom da sieĝoj kaj da bataloj, nun pereos per sia amemo? Penetrata de ĉiuj maltrankviliĝoj, kiujn donas terura malsano, lia koro, kiu sola subtenis lin tiel longe, tiun ĉi fojon superpremegas lin: la fortoj, kiujn el ĝi li prenas, lin elĉerpas. Se li forgesas sian tutan malfortecon vidante la reĝon alvenantan al la malsana princino; se ekscitita de fervoro kaj ne bezonanta nunfoje iun helpon, li alkuras por averti lin pri ĉiuj danĝeroj, kiujn ne timis tiu granda reĝo, kaj fine malebligas al li antaŭen, li iras fali sveninta je kvar paŝoj; kaj oni admiras tiun ĉi novan manieron sin riski por sia reĝo[42]. Kvankam dukino de Enghien,

---

[42] La malsano de la princino estis tre komunikebla. Kiam la reĝo volis viziti la princinon, kaj eniri en ŝian ĉambron, princo de Condé, forgesante la malfortecon de siaj kruroj, kuris al la pordo, kaj deklaris, ke li malpermesas al la reĝo eniri, kaj ke la reĝo devos paŝi sur lian korpon. Ordinare Condé apogadis sin sur du virojn; tiun ĉi fojon li kuris sen helpo, sed baldaŭ ekŝvenis.

princino kies virto neniam timis ion krom manko kontraŭ la familio aŭ la devoj, ricevis permeson resti apud li por plidolĉigi al li, la atentego de tiu princino ne kvietigas la turmentan lian maltrankviliĝon; kaj post la eldanĝeriĝo de l' juna princino, la malsano de l' reĝo kaŭzos ja aliajn agitiĝojn ĉe nia princo. Ĉu povas mi ne ĥalti ĉi tie? Vidante la serenecon elbrilantan sur tiu noblega frunto, ĉu oni suspektus, ke tiu granda reĝo, revenante al Versailles, estis liveronta sin al tiuj kruelaj doloroj, per kiuj la universo ekkonis lian piecon, lian firmecon, kaj la plenan amon de liaj popoloj? El kiaj okuloj ni lin rigardadis, kiam li, malutile por sano tiel kara al ni, bonvolis moderigi niajn kruelajn maltrankviliĝojn konsolante nin per lia vido; kiam potencantan super sia doloro kiel super ceteraj aĵoj ni vidadis lin ĉiutage ne nur ordigi siajn aferojn laŭ sia kutimo, sed ankaŭ alparoli kortegon sian kortuŝitan en la sama trankvileco, kiun al ĝi li elmontras en siaj sorĉaj ĝardenoj! Benata de Dio kaj de l' homoj estu li, kiu tiele kunigas ĉiam la bonecon kun ĉiuj aliaj kvalitoj de ni admirataj! Inter ĉiuj siaj doloroj li zorge informiĝis pri la saneco de princo de Condé; kaj li montris por la farto de tiu princo maltrankviliĝon, kiun li ne havis por la sia. Li malfortiĝis, tiu granda princo,

sed kaŝe alproksimiĝis la morto. Kiam oni kredis lin plibonfarta, kaj kiam duko de Enghien, ĉiam displenumanta devojn de filo kaj de regato, reiris laŭ lia ordono apud la reĝon, ĉio aliiĝas unumomente, kaj oni deklaras al la princo lian baldaŭan morton. Kristanoj, estu atentaj ; venu kaj lernu morti ; pliĝuste, venu kaj lernu ne atendi la lastan horon por komenci taŭgan vivon. Kio ? Atendi por komenci vivon novan, ĝis kiam en manoj de la morto, sub ĝiaj frostaj manoj vi glaciaj vi ne scios, ĉu vi kuŝas ĉe l' mortintoj aŭ ankoraŭ ĉe l'vivuloj ! Ha ! antaŭ tiu horo konfuzega kaj mallumeca punpagu per pentofaro. Per tio, ne mirigita de tiu verdikto lasta al li deklarita, la princo restas momenton silenta ; kaj subite : « Ho ! Dio mia ! diras li, tion vi « volas : volo via fariĝu : mi ĵetas min en « viajn brakojn ; donu al mi la gracon bone « morti ». Kion plian vi deziras ? En tiu mallonga preĝo vi vidas submetiĝon al ordonoj de Dio, sinfordonon al lia providenco, fidon al lia graco, kaj la tutan piecon. De nun ankaŭ, kia li aperis en ĉiuj bataloj, decidema, kvieta, zorganta sen maltrankviliĝo pri ĉio necesa por ilin subteni, tia li estas ĉe tiu lasta ekfrapo : kaj la morto ne ŝajnas al li pli malbelega, se pala kaj konsuma, ol kiam ĝi prezentas sin meze de l' fajro sub brilego

de la venko, kiun nuran ĝi montras. Dum ploregoj ekbruis ĉiuflanke, kvazaŭ ili rilatus al alia ol li mem, li daŭrigis siajn ordonojn ; kaj ne kiel objekton lin konfuzantan li malpermesis la plorojn, sed kiel malhelpon prokrastantan. En tiu momento liaj zorgoj ampleksas eĉ liajn plej malaltajn servistojn. Donacema kiel konvenas al lia rango kaj al iliaj servoj, li lasas ilin superŝutitaj per donoj, sed ankoraŭ pli honoritaj pro memormarkoj. Dum li diris ordonojn apartajn kaj plej gravegajn, ĉar la risko estus por lia konscienco kaj eterna savo, li eksciis ke li devas skribi kaj laŭformalaĵe ordoni : eĉ se mi devus, Monsinjoro, renovigi viajn dolorojn kaj revivigi ĉiun vundon de via koro, mi ne silentus pri tiu ĉi lia respondo, kiun li ripetadis tiel ofte : ke vin li konas ; ke sen formalaĵoj sufiĉas diri al vi liajn intencojn, ke vi superplenumos ilin kaj propramove kompensos ĉiujn iliajn mankojn. Ke patro vin amis, mi ne miras ; tiun senton inspiras la naturo ; sed ke patro tiel lumspirita elmontris al vi tian konfidon ĝis la lasta elspiro, ke li fidis al vi pri tiaj gravaĵoj, kaj ke li mortis trankvila ĉar certa, jen la plej bela atesto, kiun via virto povis algajni ; kaj, malgraŭ via granda merito, nur tiun laŭdon ricevos de mi hodiaŭ via Moŝto.

Tio, kion la princo komencis poste por

plenumi la devojn al la religio, meritus rakonton al la tuta tero, ne ĉar rimarkinda ĝi estas, sed, se direble, ĉar tia ĝi ne estas, kaj ĉar princo tiel priatentata de l' tuta universo neniel invitas rigardojn. Ne atendu do, Sinjoroj, tiajn solenajn parolojn, kiuj utilas nur por konigi, se ne intiman malmodestecon, almenaŭ penadon de agitata animo, kiu celas venki aŭ subkaŝi sekretan konfuziĝon. Eldiri tiajn sentencojn pompajn, tion ne scias princo de Condé ; kaj ĉe morto kiel en vivo, la vero ĉiam faris lian tutan grandecon. Lia konfeso estis humila, plena de pentomalĝojo kaj de fido. Ne longan tempon li bezonis por prepari ĝin ; la plej bona preparo al la lastmomenta estas, ke oni ne atendu ĝis tiam. Sed, Sinjoroj, donu aŭskulton al la jeno. Ĉe l' apero de la sankta viatiko, kiun li deziregis, vidu kiel li tenas sian atenton al tiu dolĉa objekto. Tiam li memoris la malrespektojn, per kiuj, ho ve! estas malhonorata tiu dia mistero. La kristanoj jam ne konas la sanktan timon, kiu alitempe ekkaptis ilin ĉe l' vido de la sanktofero. Ŝajnas, ke ĝi ne plu daŭras esti terura, kiel nomis ĝin la sanktaj Patroj, kaj ke la sango de nia viktimo jam ne fluas tiel vere, kiel sur la Kalvario. Antaŭ l' altaroj ne nur oni ne tremas, male oni malŝatas Jesukriston ĉeestantan ; kaj en la tempo, kiam unu tuta

regno klopodas por konverto de l' herezuloj, oni ne timas permesi iliajn blasfemojn. Mondumuloj, vi ne pensas pri tiuj profanoj terurегaj ; ĉe l' morto, pri tio vi pensos konfuzataj kaj ekimpresegataj. La princo rememoriĝis pri ĉiuj kulpoj de li faritaj ; kaj, tro malforta por forte klarigi siajn prisentojn, li uzis la voĉon de sia konfespatro por peti pardonon de la mondo, de siaj servistoj kaj amikoj. Per ploregoj oni respondis ; ha ! nun respondu al li profitante tiun ekzemplon. La aliajn devojn de la religio li plenumis kun sama pieco kaj sama spiritklareco. Kun kia fido kaj kiom da fojoj li preĝis la Savanton de l' animoj, kisante lian krucon, ke la verŝo de lia sango por li ne restu senutila. Jen kio justigas la pekinton ; jen kio subtenas la justulon ; jen kio refirmigas la kristanon. Kion mi diros pri la sanktaj agonipreĝoj, per kiu penante la Eklezio elblovas siajn plej fervorajn dezirojn kaj kvazaŭe la lastajn kriojn, en kiuj tiu sankta patrino finas nian naskadon al la ĉiela vivo ? Ilin trifoje li ripetigis, kaj en ili ĉiam li trovis novajn konsolojn. Dankante siajn kuracistojn : « Jen, li diris, nun miaj taŭgaj kuracistoj » ; li montris la pastrojn, kies avizojn li aŭskultis, kies preĝojn li daŭrigis ; ĉiam psalmoj en buŝo, ĉiam konfido en koro. Li ja plendis, sed nur ke li tro malmulte suferas por elpagi siajn

pekojn; li ja sentis ĝis la fino la amemon de la siaj, sed neniam li lasis al ĝi la venkon; male li ĉiam timis, ke li tro aŭskultas la naturajn emojn. Kion mi diros pri liaj lastaj interparoloj kun duko de Enghien? Kiaj sufiĉe vivplenaj koloroj povus al vi prezenti kune firmecon de l' patro kaj doloregon de l' filo? Unue per vizaĝo sub larmoj, per pli da ploregoj ol paroloj, jen algluadante sian buŝon sur tiujn manojn venkintajn kaj nun senfortajn, jen sin ĵetante en tiujn brakojn kaj sur tiun bruston patran, per tiom da klopodoj li kvazaŭe volas reteni tiun karan objekton de siaj respektoj kaj amsentoj. Liaj fortoj mankas; li falas ĉe liaj piedoj. La princo senemocie lasas lin elsveniĝi; poste, vokante sian bofilinon dukinon, kiun ankaŭ senparolan kaj preskaŭ senvivan li vidis, kun neniel malforta amemo li diras al ambaŭ siajn ordonojn, en kiuj ĉio spiris la piecon ([43]). Finante li benas ilin kun tiu fido kaj deziresprimo, kiun plenumas Dio, kaj, tia kvazaŭ Jakob, benante kun ili ĉiun el iliaj infanoj aparte; kaj ĉion, kion oni vidis ambaŭflanke, rediri estus paligi. Vin mi ne forgesos, ho princo! lia kara nevo ([44])

([43]) Vidu rimarkon (23).

([44]) François-Louis de Bourbon, princo de Conti, kaj dua filo de Armand de Bourbon, frato de princo de Condé. Tiu ĉi tre amis sian nevon, kaj li mortanta regajnis por tiu ĉi la favoron de la reĝo, kiun la junulo estis perdinta per sia senpripensa konduto.

kaj kvazaŭe lia dua filo, nek lian gloran kaj konstantan ateston pri via merito, nek lian fervoran amemon, nek la leteron skribitan de li mortanta por reakiri al vi favoremon de l' reĝo, plej karan objekton de viaj deziroj ; nek tiom da belaj kvalitoj, dank' al kiuj vi montriĝis inda okupi tiel zorge la lastajn horojn de tiel bela vivo. Mi ne forgesos ankaŭ kun kia boneco la reĝo antaŭplenumis la dezirojn de l' mortanta princo ; nek kiel sindone duko de Enghien peris por tiu favoro ; nek kian dankon la princo pagis al li por la ĝojo ricevita kaj por liaj servemaj penoj pri tiel kara parenco. Dum elŝutiĝas lia koro kaj reviviĝas lia voĉo laŭdante la reĝon, princo de Conti alvenas penetrata de dankemo kaj de doloro. Novaj amatestaĵoj : kion aŭdis kune ambaŭ princoj, tio neniam eliros el ilia koro; kaj konklude la princo konfirmis, ke neniam ili estos grandaj viroj, nek grandaj princoj, nek honorindaj, se ne kiam virtaj, fidelaj al Dio kaj al la reĝo. Tio estas la lasta parolo, kiun li lasis gravurita en ilia memoro ; tio estas kune la lasta montro de liaj amsentoj kaj la resumo de iliaj devoj. Ĉie eksono de krioj ; ĉie ploroj kaj larmoj ; nur la princo restas senemocia, kaj la agitado ne atingas la ŝirmejon, kien li metis sin. Ho Dio ! vi estis lia forto, lia neŝancelebla rifuĝejo, kaj, kiel

diris David ([45]), tiu neskuebla roko sur kiu sin apogis lia firmeco. Ĉu mi silentus pri tio, kio dume okazis ĉe la kortego en ĉeesto de l' reĝo? Kiam li legigis la lastan leteron, kiun al li skribis tiu granda viro, kaj kiam oni vidis en la tri epokoj, kiujn montris la princo, liajn servojn, pri kiuj li tiel malpeze neinsistis, en komenciĝo kaj finiĝo de lia vivo, kaj en mezo liajn kulpojn, de kiuj konfeson li faris tiel sinceran, tiam neniu koro restis netuŝata aŭdante lin paroli pri si mem tiel modeste: kaj tiu lego, kaj poste la larmoj de l' reĝo, montris kion la herooj sentas unuj por la aliaj. Sed kiam oni legis la pordankan parton, kie la princo deklaris, ke li mortas kontenta kaj tro feliĉa, ĉar li havas ankoraŭ sufiĉe da vivo por atesti al la reĝo sian ŝuldosenton, sindonemon, kaj, se li ne timas diri, sian amon; tiam ĉiuj atestis pri la vereco de liaj sentoj; kaj kiuj estis aŭdintaj lin tiel ofte pri tiu granda reĝo en liaj intimaj interparoladoj, tiuj povis certigi, ke neniam ili aŭdis ion pli respekteman kaj ameman por lia sankta persono, aŭ pli fortan por proklami liajn reĝajn virtojn, piecon, kuraĝon, grandan genion, precipe ĉe l' milito, ol la parolojn de tiu granda princo, tiel same netrograndigemajn kiel neflatemajn.

([45]) Psalm., XVIII, 2.

Dum oni tiel bele atestis pri li, tiu granda viro jam ne ekzistis. Trankvila en la brakoj de sia Dio, kien li estis ĵetinta sin nepre, li esperis lian mizerikordon kaj petegis lian helpon, ĝis li ĉesis fine spiri kaj vivi. Nun ja devus eksplodi niaj pravaj doloroj ĉe l' perdo de tiel granda viro, sed pro amo al la vero, kaj pro honto al ĝiaj malŝatantoj, aŭskultu ankoraŭ la belan ateston, kiun al ĝi li mortanta donis. Avertite de sia konfespatro ke, se nia koro ne ankoraŭ tute estas tia, kian Dio deziras, ni devas, turnante nin al Dio mem, celi ke li faru nian koron laŭ lia volo, kaj diri al li kun David tiujn ĉi dolĉajn parolojn : « Ho Dio ! kreu en mi koron puran [46] » ; ĉe tiuj vortoj la princo haltas, ŝajne penetrata de ia granda penso ; poste, alvokante la sanktan religiulon, kiu inspiris al li tiun belan senton : « Neniam mi dubis, li diras, pri la misteroj « de la religio, kion ajn oni diris ». Kristanoj, lin kredi vi devas ; kaj en lia tia stato nenion plu li ŝuldas al la mondo, se ne la veron. « Sed, « li daŭrigis, malpli ol iam ajn mi dubas. « Kiel, li parolis plue kun rava mildeco, kiel « malkonfuziĝas kaj klariĝas en mia spirito « tiuj veraĵoj ! Jes, diris li, ni vidos Dion, kia

---

[46] « Cor mundum crea in me, Deus. » (Psalm., L. 12).

« li estas, frunto ĉe frunto ». Mirinde taŭge li ripetis latine tiujn ĉi grandajn vortojn : *Sicuti est, facie ad faciem* (47) ; kaj oni ne laciĝis vidante lin en tiu dolĉa ravo. Kio fariĝis en tiu animo ? kia nova lumo ekaperis ? kia subita radio trairis la nubaron, kaj en tiu momento kvazaŭe forpelis kun ĉiuj nescioj de la sentoj la mallumojn mem, se mi maltimas diri, kaj la sanktajn malklarecojn de la kredo ? Kio fariĝis nun el tiuj belaj titoloj, kiuj flatas nin malhumilajn ? Ĉe l' alveno de tiu bela helo, kaj tuj ĉe l' unua impresiĝo per tiel viva lumo, kiel rapide malaperas ĉiuj fantomoj de la mondo ! Kiel malhela ŝajnas la brilo de la plej bela venko ! kiel oni malŝatas tiun glor-on, kiel oni bedaŭras pro la malfortaj okuloj blindigitaj de tiu logbrilo !

Venu, popoloj, nun venu ; sed venu precipe, princoj kaj nobeloj ; kaj vi, kiuj juĝas la teron, kaj vi, kiuj malfermas al la homoj la pordojn de l' ĉielo ; kaj vi, pli ol ceteraj, reĝ-idoj kaj reĝidinoj, nobelaj elnaskitoj el tiom da reĝoj, lumoj de Francujo, sed hodiaŭ mal-helaj kaj kovritaj per via doloro kvazaŭ per nubo ; venu, vidu kiom malmulte restas al ni el tiel altega rango, el tiom da grando, el tiom da gloro. Ĉiuflanken ĵetu rigardojn : jen

(47) Korint., XIII, 12.

ĉio, kion povis fari pompemo kaj pieco por honori heroon : titóloj, surskriboj, vantaj markoj de jampasinto ; figuroj, kiuj ŝajnas plori ĉirkaŭ tombo, kadukaj elmontroj de doloro, kiun la tempo forrabas kun cetero ; kolonoj, kiuj kvazaŭe volas porti ĝis la ĉielo la pompegan ateston de nia nenieco : kaj fine en ĉiuj ĉi honoroj mankas nenio, se ne la honorato. Ploru do pro tiaj senfortaj restaĵoj de l' homa vivo, ploru pro tia kompatinda senmorteco, kiun al la herooj ni donas. Sed alvenu speciale, ho vi, kiuj tiel fervore laŭkuras la vojon al la gloro, militemaj kaj sentremaj animoj. Kiu alia estis pli inda komandi vin ? Sed kiun alian vi trovis komandanto pli modera ? Ploru do pri tiu granda estro, kaj diru ĝemante : Jen kiu kondukis nin en la riskoj ; sub li lertiĝis tiom da famaj komandistoj, kiujn liaj ekzemploj levis ĝis la plej superaj honoroj de l' milito : ankoraŭ lia ombro povus gajni batalojn ; kaj jen en lia silento lia nomo mem instigas nin, kaj plie ĝi avertas nin ke, por trovi mortante ian reston el niaj laboroj, kaj ne alveni sen helpaĵoj al nia eterna restejo, kun la surtera reĝo oni devas kune servi la reĝon de l' ĉielo. Servu do tiun reĝon nemorteman kaj tiel plene mizerikordeman, kiu alkalkulos al vi ekĝemon kaj glason da akvo donitan en lia nomo pli altapreze, ol ceteraj

taksos iam la verŝon de via tuta sango; kaj komencu la tempokalkulon de viaj utilaj servoj nur de la tago, kiam vi donos vin al tiel bonfara mastro. Kaj vi, ĉu vi ne venos al tiu malĝojmonumento, vi, mi diras, kiujn li bonvolis envicigi inter liajn amikojn? Ĉiuj kune, kiom ajn da konfido vi ricevis de li, ĉirkaŭu tiun tombon; verŝu larmojn kun preĝoj; kaj, admirante en tiel granda princo amikecon tiel facilan kaj rilatojn tiel dolĉajn, konservu memoron pri heroo, en kiu egalaj estis boneco kaj kuraĝo. Tiele povu li ĉiam esti por vi kara temo; tiele povu vi profiti liajn virtojn: kaj lia morto de vi bedaŭregata utilu al vi samtempe kiel konsolo kaj ekzemplo. Kaj mi, se mi havas permeson post ceteraj veni por pagi la lastajn ŝuldojn al tiu tombo, ho princo, inda temo de niaj laŭdoj kaj bedaŭroj, vi vivos eterne en mia memoro: en ĝi stampita estos via bildo, ne kun tiu maltimo, kiu promesis venkon; ne, ĉe vi mi volas vidi nenion, kion forrabas la morto. En tiu bildo vi havos trajtojn nemortemajn; en ĝi mi vidos vin, kia vi estis en tiu lasta tago sub mano de Dio, kiam ŝajnis, ke lia gloro ekaperas al vi. En ĝi mi vidos vin pli triumfanta ol ĉe Friburg aŭ Rocroi; kaj, ravata de tiel bela triumfo, mi legos kiel dankopreĝon tiujn ĉi belajn parolojn de l' amegata disciplo: *Et hæc est victoria*

quæ vincit mundum, fides nostra (48) : « La « venko, la vera, kiu sub niajn piedojn metas « la tutan mondon, estas nia kredo ». Tiun venkon, princo, ĝuu, ĝuu eterne per la senmorta efiko de tiu sanktofero. Bonakceptu tiujn lastajn penojn de voĉo, kiun vi konadis. Vi metos finon al ĉiuj ĉi paroladoj. Anstataŭ priplori la morton de l' aliaj, granda princo, mi de nun volas eklerni ĉe vi por igi la mian sankta ; feliĉa mi, se, avertita per tiuj blankaj haroj, ke mi devos respondi pri mia administrado, mi rezervos al la ŝafaro, kiun mi devas nutri per la parolo de vivo, la restojn de voĉo jam senforta, kaj de fajro jam senflama.

---

(48) Johano, I, V, 4.